

Numero: 295.
Decembro 2016.

24-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Denove forpasis...

Denove forpasis unu jaro kaj ni atendas la novan. La jaroj kuras, kuregas.

Ĉiam ni atendas ion. Dume ni apenaŭ rimarkas, ke ni maljuniĝas.

Esperanto estas nia amata lingvo. En ĉiu jaro ni esperas, ĝi fariĝos la unusola helplingvo de la homaro.

Mi ne komprenas, kial ne disvastiĝis vaste la zamenhofa lingvo sur la terglobo. Kio malhelpas ĝian disvastiĝon? La jardekoj jam pruvis ĝian vivkapablon. Esperanto estas uzebla sur ĉiu tereno de la vivo.

Neniu diru al mi, ke ekzistas teksto, kio ne estas tradukebla per ĉi tiu lingvo.

Kompreneble ĝi ne estas miraklo. Sen lernado oni ne povas regi ĝin. Ofte ankaŭ ĝia lernado bezonas malfacilan laboron.

Sed indas lerni Esperanton. Per ĝi oni povas akiri multe da geamikoj en la tuta mondo.

Al miaj Legantoj mi deziras benitan Kristnaskon kaj feliĉan, prosperan novaj jaron por 2017.

Esperable VESPERTO ekaperos ankaŭ en la nova jaro.

Mi petas Vian helpon por ke mia Esperantolingva eldonaĵo estu pli interesa kaj kolora.

Sendu al mi viajn kontribuaĵojn, informojn, mallongajn novelojn, tradukaĵojn, versojn ktp.

Mi aperigos ilin en la sekvaj Vespertoj.

Ĉu Vi emas helpi al mi?

— Redaktanto —



Kristnaska sonĝo

La knabeto pace dormis en la lulilo. Lia panjo rigardis lin revpensante.

Ekstere jam vesperiĝig kaj grandaj neĝofolkaj falis el la ĉielo kovrante la tutan pejzaĝon.

Morgaŭ estos Kristnasko. Onidire morgaŭ alvenos Jesueto. En la aliaj domoj la infanoj malpacience atendas lin. Lia etulo scias ankoraŭ nenion pri ĉi belega festo.

La patro de la knabeto forlasis ilin antaŭ semajnoj pro stulta diskuto. Li diris, neniam revenos. Li ne deziras vidi ilin.

Tio ĉi tre malgajigis la virinon. Kristnasko sen patro. Terure! Bone, ke la knabeto nenion scias pri ilia diskuto. Sed en la venonta jaro certe li demandos: „Kie estas mia paĉjo?” Kion respondi al li?

Neatendite ŝi endormiĝis kaj ŝi havis strangan kaj kortuŝan sonĝon. Ŝia edzo revenis kaj ili denove estis kune.

Dolora estos la vekigo. Ankaŭ la knabeto malfermis siajn okulojn kaj li ridetante rigardis al ŝi. Kvazaŭ tiuj bluaj okuloj demandus: „Kie estas mia paĉjo?”

Ŝi antaŭtimis de la morgaŭa tago. Ili estos solaj. En la najbaraj domoj la familio ĉirkaŭstaras la pinarbon kaj ekprenos la manon de unu de la alia. La patro fabelos al la infanoj, dume la patrino pretigas bongustan vespermanĝon.

Ŝi estos nur kun la knabeto. Malgaja kristnasko ennestiĝos la domon. Ŝia amara ploro estos la unusola sonorilo, kiu signos, alvenis Jesueto.

Alitage ĉesis neĝi. Sur la tegmentoj de la domo sidis granda neĝo kaj pruntis al la vilaĝo festan animagordon.

Certe alifoje ŝi ĝuus ĝin kaj montrus al sia fileto la vintrajn tegmentojn.

Nun ŝi ne havis humoron. Vespere ŝi nur sidis apud la lulilo kaj ploris.

Subite ŝi aŭdis bruon malantaŭ la pordo. La virino levis sian kapon.

La pordo malrapide malfermiĝis kaj enpaŝis honteme ŝia edzo. Li iris rekte al la lulilo kaj mallaŭte demandis:

— Ĉu vi povos pardoni min?

— Ŝaŝa —



Onklino Mari

Apáti Kovács Béla

— Dua parto—

— Kion vi deziras, sinjoro paroĥestro – demandis amare la maljunulino.

— La homoj timas vin, kara onklino Mari. Eĉ najbaroj ne scias, kio okazis al vi – diris la paroĥestro kaj ŝajnis, ke li ĉagrenas. Alifoje li ĉiam estis memfidema.

— Neniu timu min! – venis rapide la respondo. – Mi deziras sekvi mian amatan edzon, kiu foriris ĉielen. Li estis grandioza, bona homo. Li povas esti nur en la ĉielo.

La paroĥestro iomete hezitis kaj kolektante sian forton kaj scion li respondis:

— Dio scias, kiam vi sekvos. Ankoraŭ ne alvenis via tempo. Vi devas vivi. Mi petegas je Jesuo Kristo, balau ĉi tiujn pensojn el via kapo. Trankviliĝu! Lasu min eniri por ke ni kune preĝu al Dio. Mi scias, la komuna preĝo donos al vi forton kaj vi estos la malnova!

Unue la maljunulino longe pensadis. Ŝi ne sciis, kion fari. Jen ŝi rigardis al la paroĥestro, jen al la ĉielo. Ŝi kelkfoje ĝustigis sian nigran kaptukon. Fine ŝi elbuŝigis mallaŭte:



— Bonvolu enveni, sinjoro paroĥestro! Eble vi pravas. Sed jam mi neniam estos la malnova. Tiu tempo forpasis.

Longe ili estis en la domo. Ili preĝis.

Dume la najbaroj scivoleme atendis, kio okazos.

Kelkaj kaŝrigardis la domon tra la lignobarilo. La infanoj stariĝis sur ĝin ĉar por ili ĉi tiu evento estis tre interesa.

Eble pasis almenaŭ duonhoron, eĉ pli, kiam la paroĥestro elvenis el la domo.

Oni timis demandi, kio okazis ene. Ĉu la onklino Mari trankviliĝis aŭ la vilaĝo perdos ŝin por ĉiam.

La paroĥestro forrapidis senvorte, ĉar lin iu atendis en la paroĥestrejo.

Ĉi tiuj minutoj estis la plej malfacilaj. Oni sciis nenion.

Iu najbarino diris decidante, ke ŝi eniros la domon kaj parolos kun la onklino Mari.

La aliaj diris al ŝi esperoplene:

— Bone Bözsi (boĵi), eniru kaj diru al Mari, ankaŭ ni deziras paroli kun ŝi kaj la tuta vilaĝo salutas ŝin.

Bözsi malrapide ekiris. Ŝi ofte retrorigardis atendante kuraĝigon de la surstrate-starantoj. Fine ŝi malaperis en la domo. La pordo ne estis ŝlosita, kiel alifoje.



La onklino Mari sidis ĉe la kuireja tablo kaj legis Biblion. Ŝi apenaŭ rimarkis la alvenantan najbarinon.

— Salut', Mari – ŝi diris raŭkvoĉe. Ĉu vi legas Biblion? Ankaŭ mi ofte foliumas ĝin. Ĝiaj vortoj donas forton al mi.

La onklino Mari eklevis siajn bluajn okulojn al Bözsi. Ŝia vizaĝo estis malgaja, sed en la okuloj ekbrilis iom da malgranda espero. Ŝi respondis tre mallonge:

— Jes.

— Mi vidis, ĉe vi estis la sinjoro paroĥestro. Ĉu li vizitis vin?

— Jes. Li vizitis min. Kial vi venis? Kion vi deziras?

— Ankaŭ mi venis por viziti vin. Ja, vi scias antaŭ la entombigo de via edzo ni ofte najbaris unu la alian. Kiel vi fartas?

— Kiel mi povus farti? Tre malbone. Géza (geeza) tre mankas. La domo estas malplena. Mi ne aŭdas nokte lian pacan ronkadon. Terure!

— Mi konsentas. Ankaŭ mi travisis ĉi tion. Kiam ankaŭ la mia foriris, mi preskaŭ frezeziĝis. Sed oni devas vivi plu.

— Ankaŭ ĉi tion diris al mi sinjoro paroĥestro – ĝemis profunde onklo Mari. - Tute same.

Ili mutiĝis kaj longa silento sidiĝis sur la kuirejon.

— daŭrigota —



POEZIO

Mikaelo Bronŝtejn

Antaŭ nelonge mi serĉadis en la inerreto. Oni povas trovi tie multajn, interesajn legaĵojn. Tiam min ĉefe interesis Esperanto poezio.

Por geesperantistoj la interreto estas vera trezorejo. Kiun interesas la literaturo, tiu trovas tie ĉion. Per la helpo de interreto malfermiĝis por ni tia pordego, kiu kondukas nin al ĉiela mondo.

Se ni deziras, ni povas konatiĝi kun Esperanto kulturo.

Por Esperanto estis kreita interreto. Mi proponas, se vin interesas Esperanto kulturo kaj literaturo, tiam vizitu tiajn paĝojn. Mi garantias, vi ne trompiĝos.

Mikaelo Bronŝtejn

Mi povas sendi al vi neĝon,

Mi povas sendi al vi neĝon,
Maltunan, lanugan,
Ĉielon puran, kiel preĝon,
Profundan, sennuban.
Fieras frostoj kun obstino
Hieraŭ, hodiaŭ...
Ĉu vi ne aŭdas, amatino:
– Adiaŭ!

Mi povas sendi al vi sunon
El ora glacio.
Vintrego vartas mian nunon
Jam ekster konscio.
De la poluso venas vento
Kaj frapas la vitron.
Ne povas venki eĉ prudento
La vintron.

Kaj restas ĝojo ununura:
Sub vido envia
Ĉiele malaperas spuro
De l' bruo avia.
Ankoraŭ ion mi atendas...
En bluo malplena
Senmovo blanka sin etendas.
– Apenaŭ!..



Jen – land' venenita, sopira socio,
Tusanta en ŝlim' de elasta moralo.
Kliniĝis, veninta pro tim' aŭ racio,
Ĉe sankta pordego de la katedralo.
Jen – knaboj aŭdacaj en tagoj minacaj
Sendube aspiras la fremdan heredon
Kun nomo de Dio, sed pravas la scio:
Ne havas la dubon – ne trovos la kredon.

Momentaj impetoj, turmentaj sekretoj
Nin pelas al pado, ŝancela, balanca...
La viv' kontinuas, kaj ni ekenuas
En iro ĉiame sencela kaj danca.
Ferminta l' okulojn, ŝtopinta l' orelojn,
Kudrinta la buŝon per firma fadeno,
Mi, certe, ĝisvivus la tagojn pli belajn,
Eĉ eble ĝis mem la mesia alveno.

Ne dubas la manoj, al ŝtipo ligitaj, –
Misagas, misgvidas en ajna aranĝo...
Por mi nur la planoj, jam realigitaj,
Fariĝas sendubaj – ne eblas la ŝanĝo.
Samkiel benato, prapatro Sokrato,
Ĉe sojlo de l' tomo kun kredo duobla
Mi diros konscie, ke ĉiam kaj ĉie
Mi preĝis al dubo, al Dubo, la nobla.

En nokto makabra
Sur ŝvita kusen'
Nestiĝis eterne
Mordanta inkubo.
Ne gajas mi kun,
Sed ne povas mi sen
Kreskantaj interne
Radikoj de l' dubo.



Por infanoj



Kristnaska donaco

Antaŭ kristnasko io trafugis super la vintra arbaro. Estis nokte kaj nur matene, kiam la frostaj sunradioj lumigis la teron la malgranda sicuro rimarkis orokoloran globon inter la arbustoj.

Ĝi estis tiel granda, kiel juglando. Sur ĝi ekbrilis la sunradioj.

— Kio ĝi estas? — ĝi demandis mire. Sed la sicuro ne povis diveni.

Longe ĝi rigardadis kaj cerbumis. Vane. Fine ĝi iris al la leporo kun la stranga globo.

— Amiko mia, leporo — ĝi komencis — rigardu kion mi trovis sub arbusto! Mi ne scias, kio ĝi estas. Ĉu vi scias?

La leporo longe observis la globon, sed ĝi ne povis respondi.

— Eble ĝi estas juglando aŭ avelo. Ĝin vi ricevis donace je kristnasko.

— Ĉu je kistnasko kaj donace? De kiu?

— Tion mi ne scias. Krisnaske Jesueto kutimas donaci al la bonaj infanoj. Certe de li vi ricevis ĝin.



— Ĉu vi pensas? — ekmiris la sicuro. — Mi certe scias, ĝi ne estas juglando aŭ avelo. Ni sicuroj tuj sentas la konatan odoron de la avelo. Vidu, ĝi brilas, kiel la suno!

— Tiam mi ne scias, kio ĝi estas — respondis la leporo. — Mi proponas, ni iru al la saĝa, arbora strigo. Laŭ mi ĝi scios.

Ili serĉis ĝian kavernon en alta kverko, sed bedaŭrinde ankaŭ la strigo estis senkonsila. Ĝi ankoraŭ ne vidis tian objekton.

Vane ili iris al aliaj bestoj neniu povis helpi.

Ili ekiris hejmen kun la stranga globo, kiam super ili la sicuro kaj la leporo ekaŭdis amaran ploron.

Anĝelete ploris kaj ĝi estis tre, tre malĝoja.

— Anĝelete, kial vi ploras? — ili demandis scivole.

— Ho, mia malĝojo estas granda — respondis larmokule la anĝelete. — Nokte mi portis bele ornamitan pinarbon al infanoj, kiam de sur mi perdis orokoloran globon. Se tion la ĉefanĝelo ekscios, mi estos punita.



La sicuro kaj la leporo interrigardis kaj samtempe ili demandis:

— Ĉu ĝin vi perdis?

La okuloj de la anĝelete ekbrilis kaj ĝi ridetiĝis.

— Ĉu vi trovis ĝin?

— Jes. Ĝi kuŝis sub arbusto proksime al mia loĝejo.

La anĝelete apenaŭ povis dankegi la trovitan globon kaj diris:

— Nun mi devas rapidi. Mi portos ĝin al la infanoj. Mi dankas vin.

Ĝi transprenis la globon kaj fulmrapide malaperis inter la arboj.

— Ĝi forflugis kaj mi restis sendonace — diris la sicuro.

Ĝi adiaŭis de la leporo. Ili deziris unu al la alia benitajn kristnaskajn festojn kaj disiĝis.

Alitage estis kristnasko. Kiam la sicuro vekiĝis matene, ĝi apenaŭ povis malfermi la pordon, ĉar antaŭ ĝi estis juglando kaj avelo en grandaj sakoj.

La sicuro komprenis, ankaŭ ĝin donacis Jesueto, ĉar ĝi estis tre bona besto.

— Onklo Adalberto —



Malnovaj Kristnaskaj bildkartoj

Malnovaj Kristnaskaj bildkartoj

